# *Ni saĝigos vin… kaj vi saĝiĝos!*

**Kiel funkcias -IG-kaj -IĜ-?**

-IĜ- indikas rezulton. Ni uzas ĝin kiam pli gravas al ni scii la rezulton ol la faranto aŭ la kaŭzanto de ago.
-IG- indikas kaŭzon. Ni uzas ĝin por indiki faranton aŭ kaŭzanton de ago.

Kiam ni uzas -IĜ- ni kreas novan verbon kun unu ligo malpli.
Kiam ni uzas -IG- ni kreas verbon kun unu plia ligo.

Baza demando, kiam ni uzas -IG aŭ IĜ kun radiko: Ĉu tiu radiko havas aktivan verban formon aŭ ne?

| | **Unu-liga verbo** | **BAZO** | **Du-liga verbo** |
|---|---|---|---|
| La baza radiko: 1) ne estas verba 2) ne havas aktivan verbon. Senco de IĜ = EK. | La boato grandiĝos | La boato devas esti granda. | 005 blovas kaj grandigas ĝin. |
| | 005 spioniĝis antaŭ kvin jaroj. | 005 estas spiono. | Aventuremo spionigis lin. La estro Z spionigis lin. |
| | 005 fortiĝas. | Nun, li estas forta. | Ekzercado fortigas lin. |
| | La servisto silentiĝas. | La hotela servisto silentas. | 005 silentigas lin. |
| | La kamelo laciĝas. Ĝi ekestas laca. | La kamelo estas laca. La kamelo lacas. | La varmo kaj la pezo de 005 lacigas la kamelon. |
| | La kamelo malrapidiĝas. | La kamelo estas tro malrapida. Ĝi tro malrapidas. | 005 rapidigos ĝin. |
| | 005 senpacienciĝas. | Li estas senpacienca. | La malrapida kamelo senpaciencigas lin. |
| | La mapo enĝibiĝas. | La mapo iras en la ĝibon. Do, ĝi enĝibas. | 005 rapide enĝibigas la mapon, ĉar la gardisto revenas. |
| | 005 ĵus surkameliĝis. | Do, nun 005 surkamelas. Li estas sur la kamelo. | Z surkameligis lin per ordono. La helpanto fizike surkameligis lin. |
| La baza radiko estas verbo, sed de korpa moviĝo. Senco de IĜ = EK. | 005 envenis kaj sidiĝis. | Nun, li sidas. | Z diris: 'Sidiĝu, 005" Do, Z sidigis lin. |
| | Lina sidiĝas kaj ludas per pupo. | Lina sidas. La pupo sidas. | Lina sidigis la pupon. |
| | "Suben!" krias 005. La kamelo genuiĝas. | La kamelo genuas. 005 forglitas de ĝi. | 005 genuigis la kamelon. |
| | 005 stariĝis. | 005 staras. | Z starigis lin, per ordono. |
| | La misio stariĝis. | Do, la misio staras (!) | Z starigis la mision. |
| | La gardistoj kaŭriĝis. | Nun, ili kaŭras senmove. | Pafado kaŭrigis ilin. |
| | | | |

| | Unu-liga | Du-liga | Tri-liga |
|---|---|---|---|
| Netransitiva verbo kun aktiva signifo. ne uzu IĜ. | 005 alvenis | Z alvenigas lin. | |
| | 005 timas | La krokodilo timigas lin. | |
| | La kamelo kuras. | La gardistoj kurigas ĝin. | |
| | 005 saltas suben. | La senespera situacio saltigas lin. | |
| | 005 falas. | La ombrelo-paraŝuto faligas lin sekure. | |
| | Okazas katastrofo! | La kamelo krias 'Zamenhof' kaj okazigas la katastrofon. | |
| | Kvardek gardistoj aperas. | La alarmo aperigas ilin. | |
| Transitiva verbo kun aktiva signifo. Senco de IĜ: simila al pasivo. | La fenestro rompiĝis. (Ĝi estas rompita) | La ŝtelisto rompis la fenestron. | La ĉefo diris: 'Rompu tiun fenestron!" La ĉefo rompigis la fenestron. |
| | La Unua Libro repreniĝos. | 005 reprenos la Unuan Libron. | Z ordonas la OO5: 'Reprenu la unuan Libron'. Li reprenigas la libron. |
| | 005 certas, ke li ne kaptiĝos. | Ĉu la volapukistoj kaptos la spionon? | La volapuka ĉefo volas kaptigi la spionon. |
| | La banano manĝiĝas. (Ĝi estas manĝata). | La kamelo manĝas la bananon. | 005 manĝigas la kamelon per banano, aŭ 005 manĝigas bananon al la kamelo. |
| | La kamelo vidiĝas. | La gardisto vidas kamelon | 005 vidigas la kamelon al la gardisto. |
| | Vorto diriĝos. Ve! | "Diru unu vorton" krias 005. | 005 dirigas vorton. |

**Interesaj radikoj:**

***TRU-*** Tio estas substantiva radiko, sed havas verbon 'TRUI' kiu estas aktiva. Ĝi ne signifas 'Esti truo' sed 'Fari fruon'. Sekve ĝi apartenas al la kvara grupo, ne la dua. Do, en trajno konduktoro truas la biletojn, kaj la biletoj truiĝas.

***LOK-*** Simile, tio havas aktivan verbon, "LOKI" = "Meti en lokon". Do, mi lokas la pinglon sur la mapon.

***DIPLOM-*** Verbo ekzistas: "Doni diplomon". Do, la instruisto diplomas la studentojn.

***INTERES-*** estas verba radiko, ne adjektiva.

***SATIR-*** ne havas verbon, do la verbo SATIRI povas signifi nur "Esti satiro", Mi ne rajtas satiri la prezidanton, mi devas satirigi lin.

***SCII-*** Interesa kazo, ĉar tiu verbo foje priskribas agon, foje staton. Sekve ekzistas du uzmanieroj.

Kiel aktiva verbo: Mi scias la novaĵon – La novaĵo sciiĝas. (= estas sciata)
Kiel stata verbo: Mi scias la novaĵon – Mi sciiĝis pri la novaĵo hieraŭ. (= eksciis).